

& Konsolado:

< Rekante 20 el 34 batoj por strofo, entute 340 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (La stranga butiko, 1931). Baladigis Martin Strid (2017) per feroaj melodio kaj rekantaĵo de Vilmunda balado kaj disduigo na strofoj.>

(#Melodio:

/falmi sofa fami mire reerere dore mi; mi fami fami faasoso sofa fami reldo;

(#Rekantaĵe: mimi fa mi re; reerere dore mi; mimi mimi mi fa;so sofa fami fami reldo; mimi fa mi re)

)×10)+

(&Strofoj:

'1 /Fo2rviŝu viajn larmojn, – jen mia nazotuk', – ; En tiuj ondoj dronus eĉ virto de eunu2k';

(×: **Dancu mastrino ; belan elektas mi. ; Dancu min al mano ; ja bele kiel povas vi2. ; Dancu mastrino.**)

'2 Mi cedas kavalire, do estu vi anĝelo, ; Kaj ne plu ni disputu pristulta bagatelo!

'3 Mi amis vin hieraŭ kaj morgaŭ amos vin, ; Mi kisis vin infano kaj kisos vin avin',

'4 Mi ŝatis plenajn formojn de via juna aĝo ; Kaj vian maljunecon mi portos kun kuraĝo.

'5 Ne estas mia koro frivola papili', ; Ĉar oni amas firme en mia famili',

'6 Kaj jen: praavo mia, la gentopatro Paŭlo, ; Pro amĉagreno frua eterne restis fraŭlo!

'7 Do fidu miajn vortojn, – mi estas inda fil' ; De gento famiĝinta sen sabro, sen pafil',

'8 Kaj en blazono mia ni legas la devizon: ; "Prefere ol vin perdi mi perdus la ĉemizon!"

'9 Forviŝu do la larmojn, la honton de l' jarcent', ; Kaj kedu nun sincere jemia nobla sent';

'10 Mi pagis vian robon, mi pagos la mantelon... ; Ĉu bone? – Jes, ni ankaŭ aĉetos la ĉapelon!